

Nepre legu en „Medicinista gazeto“ Nro 37/82 la grandan artikolon „Esperanto en medicino“. Interalie ĝi varbas por partopreno en IV-o IMEK (Internacia med. Esp. Konferenco) en Poprad 25.-29. VII. 1983.

S-ano Josef Lukeš el Příbram neatendite mortis la 18an de oktobro en la aĝo de 51 jaroj. Li naskiĝis la 12an de jan.1931 en Černětice apud Volyně. Li finlernis metion-horloĝiston kaj fajnman mekanikiston kaj per granda diligento li studis komputilojn en Germana fed. respubliko kaj 2x en Pollando. En tiu fako li estis konata majstro kaj en la klubo en P.li elstarigis kie diligenta kaj oferema ano. Daŭre li restos en nia memoro.

Por instigi komencantojn s-ano Z. Řezáč, Vítězná 355, 46841 Tanvald-Šumburk aranĝos la tradukajn konkurojn duonjare. Skribu al li pri la tasko!

Se vi veturos en Hispanion, notu adreson: Esperanto-oazo, Achilles SANZ, Apartado 171, GANDIA (Valencia)Hisp.Mara plaĝo 10 km-grotoj-naĝejo hejtita per akvaj sunkolektoj-vintre per generatoro -ĉiuvesperaj piroteknikaj fajroj - tre malmultekoste – skribu pri informo.

Esperantista vegetarano – nova redaktanto (Stano Marček, 29j, Martin) – nova belaspekta vizaĝo sur kreta papero – sana vivmaniero – naturdefendantoj – longviveco – eksterlandaj raportoj. Skribu al S.Marček, Zvolenská 15, 03601 Martin.

Lingva anguleto:

Antonín Slanina: „La“-difina artikolo.

Kiam oni ĝin ne uzas:

- 1) En vokativo (5.pád): Filo, lernu bone! Panjo (maminko), donu al mi io
- 2) Antaŭ nomoj de personoj, urboj, landoj kaj antaŭ titoloj: (před vlast.jmény): *Sinjinoro* Nová, diru ... Fraŭlino Marie, ... En Eŭropo. Praha estas ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio. Mi veturos al Francio. Ĉu vi parolis kun profesoro?

Urĉitě si přeĉtěte ve „Zdravotnických novinách“ 37/82 velkŭ ĉlánek „Esperanto a medicina“, který propaguje pro IV.IMEK (Internacia medicinista Esperanto-Konferenco) v Popradu 25.-29.ĉervence 1982.

S-ano Josef Lukeš z Příbramě zemřel neĉekane 8.října 1982 ve věku 51 let. Narodil se 12.I.31 v Černětících u Volyně. Vyučil se řemeslu hodináře a jemného mechanika a s velkou pilí studoval komputery v NSR a 2x v Polsku. Byl známým mistrem svého oboru a v příbramském klubu vynikal jako pilný a obětavý člen. Zůstane nám trvale v paměti.

Pro pobídnutí začátečníků s-ano Z.Řezáč, Vítězná 355, 46841 Tanvald-Šumburk pořádá pololetně překladatelské soutěže. Napište si mu o úlohu!

Budete-li cestovat do Španělska, zapište si adresu: Esperanto-Oazo, Achilles SANZ, Apartado 171, GANDIA (Valencia), Hisp. Mořská pláž 10 km – jeskyně – bazén s vodou ohřátou slu.bateriemi – v zimě větrným generátor. Každovečerní ohňostroje – velmi levně – pište si o informaci.)

Esperantista vegetarano – nový redaktor: (Stano Marček, 29r, Martin – nový pěkný vzhled na křídovém papíře – zdravý způsob života – ochránci přírody – dlouhověkost – zahraniční zprávy. Pište S. Marčekovi, 03601 Martin, Zvolenská 15.

- 3) Antaŭ infinitivo (neurĉity způsob): Promeni estas agrable. Multe lerni. Bone vidi.
- 4) Antaŭ posevivoj kaj montraj pronomoj (před přivlastňovacími a ukazovacími zájmeny): Mia ĉapelo. Via domo. (Sed: Mia domo estas granda, la via estas malgranda – ĉar tie la artikolo „la“ anstataŭas (zastupuje) substantivon. Tio estas arbo. (Sed: La arbo, kies (jehož) folioj falas). Kiu estas tiu sinjoro? Tiun homon mi ne konas. Ĉiu infano ploras.
- 5) Antaŭ nomoj de monatoj kaj tagoj: En vendredo estas kurso de Esperanto. Tio okazis en decembro. Hodiaŭ estas mardo, la 10-an de majo.
- 6) Antaŭ bazaj numeraloj (základní číslovky): Mi havas dek pomojn. Kvin metroj.
- 7) Se oni volas indiki (označit) parton de io: Donu al mi panon! (la pecon de ĝi). Infano manĝis bombonojn. Ŝi portas lignon.
- 8) Antaŭ nomoj de ŝtofoj de nedifina kvanto (látky neurč. množství) – indiko, kreto, vitro, drapo ...: Per inko kaj kreto oni skribas. Vitron oni uzas por fenestroj. Drapo estas ŝtofo (látka, materiál), el kiu oni faras vestojn. Mi trinkas bieron, vi trinkas vinon. Infanoj trinkas lakton aŭ limonadon.

L.L.Zamenhof: Proverbaro Esperanta (Esperantská přísloví). Helpu al ni traduki popolan saĝecon (ĉehigi) – ĉe mankantaj tradukoj (pomozte nám přeložit do češtiny lidovou moudrost – u chybějících překladů!

- | | |
|--|---|
| 1 Peko kaj eraro estaj ecoj de l' homaro (mýliti se je lidské ?) | 26. Groŝon ŝtelis – ho ŝtelisto! Milojn ŝtelis – financisto. (?) |
| 2. Nur tiuj ne eraras, kiu nenion faras (kdo nic nedělá, ten nic nezkazí) | 27. Ŝteliston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas. (?) |
| 3. Fidante al vorto, li atendas ĝis morto. (?) | 28. Pli bona io ol nenio (Lepší něco nežli nic). |
| 4. Kiu ne riskas, tiu ne gajnas (Kdo neriskuje, nevyhraje). | 29. Al malriĉulo ovo kiel al riĉulo bovo. (?) |
| 5. Espero kaj pacienco, kondukas al potenco (Trpělivost růže přináší). | 30. Rostita kolombeto ne flugas al buŝeto (Pečení holubi nelítají do huby). |
| 6. Komenco bona, laboro duona (S chutí do toho a půl je hotovo). | 31. Vortoj sakon ne plenigas (Slov se nenajíš). |
| 7. La plej granda potenco kuŝas en la komenco. (?) | 32. Ameno diablon ne forpelas. |
| 8. Unua paŝo iron direktas. (?) | 33. Sen laboro ne venas oro (Bez práce nejsou koláče). |
| 9. Li estas kompetanta, kiel besto al arĝento (Rozumí tomu jako koza petřeli). | 34. Ne venos rato al la kato. (?) |
| 10. Li komprenas predikon, kiel bovo muzikon. (?) | 35. Ne gutas mielo el la ĉielo (Pečení holubi nelítají do huby). |
| 11. Neleĝe akirita ne estas profita. (?) | 36. Rido matene, ploro vespere. (?) |
| 12. Kiu fremdan avidas, propran forperdas. (?) | 37. Tro da libero kondukas al mizero. (?) |
| 13. Kiu rabi eliras, ofte nuda revenas. (?) | 38. Tro saltas la rato ĝin kaptas la kato. (?) |
| 14. De fremda groŝo ŝiriĝas la poŝo. (?) | 39. Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas. |
| 15. Fremda spesmilo estas sen utilo. (?) | 40. Kun kiu vi festas, tia vi festas. (?) |
| 16. Pagi sen partopreno por fremda festeno. (?) | 41. Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas (Vrána k vráně sedá). |
| 17. Kiso publika estas kiso malamika. (?) | 42. Ŝlosilo uzata ruston ne konas. (?) |
| 18. Kiso malsincera estas danĝera. (?) | 43. Akvo kura – akvo pura. (?) |
| 19. Kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso. (?) | 44. Por ŝafon formanĝi, lupu trovas pretekston. (?) |
| 20. Lang' mola kaj laŭvole petola. (?) | 45. Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia. (?) |
| 21. La plej bona gvidilo estas la lango. (?) | 46. Muso la katon ĉiam ofendis. (?) |
| 22. Peto kaj demando kondukas tra l' tuta lando. (?) | 47. Ŝerce dirite, cele pensite. |
| 23. Lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas. (?) | 48. Du militas, tria profitas (Když se dva perou, třetí se směje). |
| 24. Sidu lango malantaŭ la vango. (?) | |
| 25. Fino bona – ĉio bona, finiĝis malbona – des pli bona. (?) | |

49. Ne ĉio brilanta estas diamanto (není všechno zlato, co se třpytí)
50. Ne ĉio utilas, kio brilas (-“-)
51. Pli bona amiko intima ol parenco malproksime. (?)
52. Pli bona apude najbaro ol frato post arbaro. (?)
53. Pri la lupo rakonto, kaj la lupon renkonte (My o vlku a vlk za humny).
54. Al mono kaj forto humiliĝas la sorto. (?)
55. Ju pli da havo, des pli da pravo. (?)
56. Ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto. (?)
57. Tro forta ĵuro, la afero ne pura. (?)
58. Al loko dolora ni manon etendas – al loko ĉarma okulojn mi sendas.(?)
59. Kie jukas, tie ni gratas. (?)
60. Fiŝo pli granda malgrandan englutas. (?)
61. Granda nubo, malgranda pluvo. (?)
62. Monto gravediĝis, muso naskiĝis. (?)
63. Granda telero, malplena kulero (Chlouba na ulici, nic v truhlici).
64. Bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno. (?)
65. En landoj transmaraj estas oraj arbaroj. (?)
66. Pri lando malproksima estas bone mensogi. (?)
67. Lernado sen fruktoj ne restas. (?)
68. Sperta mano ne restas sen pano. (?)
69. Ne iru fadeno kontraŭ kudrilo. (?)
70. Restu tajloro ĉe via laboro (Ševče, drž se kopyta)
71. Al grandaj sinjoroj, grandaj honoroj. (?)
72. Fremda malfeliĉo instruas. (?)
73. Nun instruas eraro, kiun faras najbaro. (?)
74. Bela por vizaĝo, sed ne bela por saĝo. (?)
75. Kapo majesta, sed cerbo modesta. (?)
76. Granda kranio, sed interne nenio. (?)
77. Pro multa da arboj, li arbaron ne vidas (Pro stromy nevidí les)
78. Kie estas mielo, tie musoj ne mankas. (?)
79. Al kuko kaj kaso ĉia venos amaso. (?)
80. Kie homoj ekzistas, tie ankaŭ ombro traviĝas. (?)
81. Neniu sanktulo estas sen makulo. (?)
82. Kie regas la forto, tie rajto silentas. (?)
83. Kiu havas la forton, tiu havas la rajton. (?)
84. Ĝibulo ĝis morto restas ĝibulo. (?)
85. Forĝu feron dum ĝi estas varmega (Kuj ŝelezo, dokud je žhavé)
86. Fleksu arbon dum ĝis juneco. (?)
87. Lernu juna por esti saĝa maljuna. (?)
88. Se junulo ne lernis, maljunulo ne scias. (?)
89. Kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sen jam ne retrovas (Pozdě bycha honit)
90. Okazon kaptu ĉe la kapo, ĉar la vosto estas glita. (?)
91. Se elsaltas la okazo, ĝi romiĝas kiel vazo. (?)
92. Atendis, meditis, ĝis en tombon englitis. (?)
93. Barelo malplena sonas plej laŭte (Prázdné sudy nejvíc znějí)
94. El du malbonoj pli malgrandan elektu. (?)

Karel Blažek MH.

Uzu proverbojn, frazojn – beligu nian lingvon!

Novaj finstudintoj de la koresp. kurso:

Noví absolventi koresp. kurso:

Altmanová Blanka, 1957, 34501 Krákov, Starý Klíčov 7

Jaklovská Eva, 1950, Praha 8 Hloubětín, Slévačská 1BB ČKD

prof. Jiří Růžička, 1933, 40747 Varnsdorf III, Budějovická 2784

Okaze ilia eniro en nia „verda familion“ ni kore bondeziras al ili!

Se vi serĉas seriozan korespondamikon skribu al la klubestro (8 korespondemuloj) Peter Liebig, Albert Schweitzer, Str.9, 77 Hoyerswerda, GDR.

Divastigu viajn konoj!

Rozšiřte svoje znalosti!

Konversacia temo: ADMONI (napomínat, upomínat) – RIPROČI PARDONI.

Ne hontu penti (pykat) pri faro, hontu persisti (přetrvat) en eraro (omyl)

Kia diabla petolulo (diblík)! Fari diablaĵojn (čertoviny), stultaĵojn (blbosti). Fari la kutimaj malsaĝaĵojn. Fari malhonestajojn. Elpensi, taksi (spřádat), kulpi mensogon. Malobei (neposlouchat). Transpasi permeson (Překročit zákaz). Senkore konduti (chovat se bezcitně). Agresa tono. Infanaĵo (dětinskost) inda nenian atenton (=inde je nenia atento). Agi (jednat) sen la influo de ... Provi malgrandigi sian eraron. Ĵeti, meti la kulpon sur iun. Esti pura de peko. Havi blankajn manojn (čisté ruce). Kompreni la *gravecon* de sia kulpo. Konfesi (přiznat) sian kulpon.

Mi volas fari al mi aflikton pro tio (zármutek).

LIAZ 02-82/29-KP/Hr

Severa admono (napomenutí), averto (varování, upozornění). Esti ĉe la limo (hranice) de sia pacienco. Puninda (trestuhodná) kulpo. Senkapa malseĝulo, stultulo. Perdi sian paciencon. Rigardu al mi en la okuloj. Mi ne bezonu (aĵ nepotřebuji) diri tion duafoje. Stultulo trovas ĉiam pli grandan stultulon, kiun li admiras. Eĉ stultulo tion scias. Senfina estas la nombro da stultuloj.

Doni al iu malgrandan averton ne fari tion. Patro admoni. Silenta riproĉo. Riproĉa rigardo. Akraj riproĉoj. Pike riproĉi. Lavango (záplava) da riproĉoj. „Skoldi“ (=riproĉadmoni; neologismo).

Meriti riproĉojn, la vergon, vangofrapon bastonbatojn (prut, políček, nařezat holí). Pugvergi (na zadek našlehat). Brutale trakti (jednat) iun. Fari al iu bonan lavon (dát mu za vyučenou). Sapumi al iu la okulojn. Puni infanon per senigo de deserto (desertní cukroví). Ne atendi lian ploradon. Justa puno (spravedlivý). Prave punita, laŭmete (podle zásluhy). Severa, sed justas.

Ŝpari nek penon nek admonon. Faru al li predikon (řeč) pri moroj. Doni al iu moralinstruon, morallecionon. Instrui al iu kiel paŝi rekte. Doni virtan (ctnostný) ekzemplon por iu. Ludi la virtulon. Preni ekzemplon de iu (vzít si z někoho příklad). Malsaĝa amiko estas pli danĝera ol malamiko. Efika admono. Afabla vorto pli efikas ol forto. Ĉiuj miaj admonoj nenion helpis. Stultigi (zblbnout) infanon per senĉesaj (nepřetržitými) admonoj kaj riproĉoj. Grubli flanken (pod vousy bruĉet). Murmuri tra la dentoj en sian barbon. Forĵeti konsilojn (upustit od rad). Malatenti la riproĉojn. Ne ami edifajn moralajojn. Ne ami edifajn moralajojn (povznášející). Akcepti la riproĉojn sen *palpebrovibro* (mrknutí oka). Balbuti pardonon. Pente bedaŭri. Bati sin sur la bruston (bít se v prsa). Pentosignes. Pardonebla eraro. Mi pardonas kondiĉe (pod podmínkou), ke vi neniam kulpu tiun kulpon. Fari belajn promesojn. Preta forspingi (smýt houbou) la *pasintaĵoj* = *pardoni* ĝis plena forgeso. Li ne esperu pardonon. Mi bedaŭras mian severecon. Bonaj ekzemploj pli bone influas (ovlivní) ol admonoj. Tio ne helpos lin.

El „Kiel diri?“ Lentaigne

Karel Kraft: JUVELOJ (drahokamy) MERGIĜAS (ponoří se) EN TAJDA (přiliv – odlivový) SABLO (písek). Biografio pri Ferdinand Krch, meritplena instruisto, amiko de Esperanto):

Kiam mi por la unua fojo (poprvé) ekvidis Ferdinand Krch (elparolu Krh), ĉirkaŭitan de atentemaj gejunuloj, nenion esceptan (výjimečného) mi rimarkis. Ankaŭ mi neniam antaŭe aŭdis pri li. Nur poste mi komprenis, ke lin mi povas danki por la ĝuo (požitek), kiun mi trovis kiel knabo la legado de gazeto Lípa (tilio) de li redaktata. Nun staris antaŭ mi svelta (štíhlý) sepdekjarulo, elradianta (vyzařující) trankvilan energion. Oni povus aldoni solidan pedegogian lertecon kaj rutinon. Natura simpleco, ordinareco, modesteco kaŝis (skrylo) lian nekutiman moralan kaj fakan elstarecon. Eble pro tio, ke li perfekte sciis kaŝi sian superecon, sian noblan animon, nur dum plua malkovrado (odhalování) de liaj kvalitoj kreskis mia admiro al li, kreskis mia estimo. Foje li glosis mian mension pri iu modela kultura aktivulo, kaj tamen neglektata (zanedbávaný): Juveloj oni malfacile rimarkos en mara sablo, ili mem ne elmerĝas, oni devas spure serĉi (vystopovat) ilin. Nu, kaj nun, post lia forpaso, ni ĉiam klare vidas, ke ĵus (právě) lin trafe (výstižně) pentras ĉi tiu alegorio. Lia ekstrema modesteco (skromnost) ne permesis, ke oni akcentu lian personecon. Ĉe ĉiu klopodado, ankaŭ ĉe intensa verkado (spisovatelské činnosti), li preferis resti en ombro nur kiel stimulant, eĉ kiam li ĉefrolis (hrál hlavní úlohu) kiel inicianto aŭ aŭtoro.

La verko parolos mem, ne mi, sonis lia slogano (heslo). Kaj mi ofte ankaŭ rememora ĉi tiujn liajn vortojn: La plej gravan artaĵon prezentas la arto vivi. Kaj vere, lia arto vivi sciis cizeli (vytepat) vera majstran verkon. Ĝin mi provos pale skizi.

Malfacila tasko konturi precize kaj fidele lian multflankan personecon, lian multbranĉan kontribuon (příspěvek) al la ĉeĥa – kaj ne nur al la ĉeĥa-kulturo. Ĉu sumi (shrnout) plurajn omaĝajn (příležitostné) artikolojn, aperintaj post lia morto en 1973, ĉu ĉerpi el ekspozicio pri meritita instruisto Ferdinand Krch en Praha en 1981? Ĉu serĉi inspiron en ariĝo de liaj amikoj omaĝe al la centjara datreveno de lia naskiĝo, kiu montris, kiom vive funkcias lia heradaĵo (dědictví)? La atmosfero dum la kunesto ne permesis enmiksi ion balastan. Kvazaŭ nia „onklo“ aŭ frato Fedor, kiel ni kutimis nomi lin, ĉeestus nian kunvenon. Jes, lia infekta vivoĝuo (radost ze života), lia optimismo kvazaŭ kiel nevidebla fadeno (nit) ĉirkaŭbrakis nin. Ĉiu, kiu ekparolis per lia buŝo. Antaŭ ni denove kreskis tiu pura homo, kiu ĝisoste (až na kost), ke vivi signifas kunsenti, servi. La seriozan atmosfero de la kunesto (být při tom) ne ĝemis radioj de rido, kiam oni rememoris iujn gajajn situaciojn, kiujn Fedor sciis tiom lerte elvoki. Li ne klopodis konstrui iun sistemon. Li simple amis la vivon. Li servis per sia amo. Li diris: Se oni amas, oni ne demandas kial. Oni simple amas. La amo funkcias per si mem (samo o sobě). Kaj nun mi provos (pokusím se) esplori la sporadajn erojn de la fadeno de lia vivmodelo „Kiel fariĝi bona homo“, kiujn mi neperfekte sukcesis kolekti.

Li naskiĝis 7-an de majo 1881. Laŭ deziro de sia patro li ekstudis la juron (práva). Sed la akademia kariero de juristo ne logis (vábila) lin. Li forlasis studojn por dediĉi sin plene al eduko. Li komencas karieron de pedagogo kiel instruisto de elementa lernejo en Libeň (alparolu Libenj), neglekteta (zanedbávaná) kvartalo de Praha. Jam komencon de lia kariero de pedagogo signalas principo, kiun li sisteme disvolvadis dum sia tuta vivo kaj kies (jehož) riĉan rikolton ĝuas ĉiuj, kies vivo estis stampita per lia influo. Jen memoro pri lia unua enpaŝo de instruisto en la klason: Sur la katedro li legas sciigon de lia antaŭulo: Postulu daŭre respektigi la feran disciplinon! Li, nova instruisto, trairas la interbenkan spacon (prostor) kaj rimarkas, ke iu lernanto mankas. Li ne punas lin. Eksciinte, ke la lernanto malĉeestis pro sia inklinego al ĉevaloj, la instruisto kontraktas kun li, ke ili unue preparolos la aferon, kiam ajn la knabon rekaptos la dezirego pri ĉevaloj. Eble riska propono en plej kutimaj medioj por la plej kutimaj instruistoj. Ne por Fedor. Li agas, konfidante la naturan inklinon de la infano al la bono. Tion li lernis de L.N.Tolstoj. Li imitas liajn pedagogajn konceptojn, adaptas ilin al la cirkostancoj laŭ sia propra eduka instinkto. Kaj la rezulto ĉe Fedor? La lernejevizitadon nur ne malkreskas, sed, male (naopak) la lernejhoroj ne sufiĉas al la lernantoj. Eĉ pli (ba dokonce více): La lernantoj pligrimas ankaŭ en foran kvartalon Smíchov (epl. smiíhov) por daŭrigi en lia hejmo la lernejjajn kaj kromlernejajn programojn. (Daŭrigota – na pokračování)

LA REDAKTANTO DE VERDA FAMILIO DEZIRAS AL LA LEGANTOJ FELIĈON, SANON
kaj VIVKONTENCON en LA NOVA JARO 1983 !

Korespondi deziras: Mallongiloj: (zkratky) bk=bildkartoj; ĉl=ĉiu lando; ĉt=ĉiu temo; dez=deziras; iŝ=interŝanĝas; itŝ=interesiŝas; j=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko; pm=poŝmarkoj; tm=tutmonde.

23j laboristo ŝatus kor pri moderna m, gitarludo, modelkonstruado (ŝipoj), Birk Buchholz, Frankenhof 15, DDR-2300 Stralsund, GDR

17-25j geesperantistoj dez kor pri m, naturvagado: Imre Radó Vasút, KISHHEGYES, YU-24321 Jugoslavio

Lourdes Rivero del RISCO, dommastrino, Juan *Caniro* 66, *CASCORRO-GAMAGÜEY*, Kubo, dez kor tm

Anna Benites TAIT, kuracistino, Calle Benito Morell 28, c/Gabriel Garcia y M.Gómez, *GHAIMERO-CANAGÜEY*, Kubo dez kor tm

ESPERANTO-CENTRO, „Jeune se libre“, 89, rue Saint-Paul, PHOENIX, Maŭricio bezonas diversajn E-materialojn (revuojn, librojn). Korespondadreso: Patten Marsila, Av. Jacinthes 7, Q-Bornes, Maŭricio

Shasraj, CANNAYYA, Royal-Road Castel, Chertz Indiano-Rest, Ville de CUREPIPE. kaj Ramjutun SUDHAKAR, Nicholzen Road 26, *VACOAS*, Maŭricio.

Se vi dez kor amikiĝi kun esperantistoj el la antikva, 2500-jara Samarkando, turnu vin al: *L'ETERKLUBO* „ESPERANTO“ SU-703000 ARKANDO, Glavpostamt, abon ja.76, Uzbekistano, Sovetunio.

Kiu volas helpi al la juna E-movado en Afriko, skribu al UEA-komisiito Hans BAKKER, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

Maria Lelichowska (18-j) pri sporto kaj kulturo, ul.J.Korzaka 10/27, PL-35-114 RZESZÓW, Pollando

Krzysztof SILWON, 28J, oficisto, BRÓNCZANY 33, PL-16-061 JUCHWOWIEC, voj. BIALYSTOK, Pollando pri literaturo kaj historio.

Per bela bildkarto bonvolu ĝojigi mian, viglan 84-jaran onklon: Sinjoro Atono Plukker, Bejaardentehuis (pliaĝuldomo) Amby, Achter de Hoven 25, 6225 EK Amby, Nederlando. Antaŭdankas sinjorino M.van Bentum.

Farooq Ahmad Khan dez kor kaj itŝ bk, pm kaj bankbiletojn tm, 14j lernanto. Skribu al: Sher Bahadur Mirza, V.P.O.Dakki, Teh.Charsadda, NWFP Pakistano.

Elmar TAAVO, Järve 48-15 *SU-A* 200015 Tallin, Estonio, Soveta Unio, 68j filatelisto serĉas pli aĝaj korespondantojn.

Kambiz Ghadiri, No 374 Khorshid (REZA I) st., Darvazeh, Shemran, Teheran 11546, Irano, dez kor pri fotografado kaj sciencaj demandoj

Barbara WŁODARCZYK, ul.Ogradowa 8, PL-24-200 Belzyce, Pollando, 20j polino dez kor pri m kaj kolektas bk.

Jerzy Hartman, ul.St.Nadstawek 17, PL-63830 Pepowo, Pollando, studento de pedagogio dez kor tm, itŝ bk.

Danute DAČIULYTE, Lauko 11, 234880 KUPIŠKIS, USSR-Litovio, 14j lernantino kor pri m, sporto, literaturo, pm, bk.

JUNGIĆ Senka, IV prigradski put 1678000 B.Luka, Jugoslavio, 16j lernantino dez itŝ insignojn bk, poemojn

BILOGREVIĆ Ivica, YU-Avde ĈUKA 92, 78000 B.LUKA, 25j laboristo itŝ E-aĵojn.

REZIĆ Nataŝa, Slaviŝe Vajnera-Ĉiĉe 8/E6, YU-78000 B.LUKA dez itŝ insignojn, pm.

Sveta Nikovova, 17j., 335007 Sevastopol, str.*Narodnih* Opolčencev 15, dez. kor pri historio, biologio, muziko, literaturo, kolektas bildkartojn.

Meralis Castrillo M., Urbo Santa Ines, Av.Principal, Ota Yolissol, Caracas 1080, Venezuela, dez. korespondi pri ĉiuj temoj.

Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curico, Chile, 19j.knabo, volas korespondi ka interŝanĝi revuojn Sergeo Geraseviĉ, 333024 SIMFEROPOL, Str.Imeni 60-letija Oktjabra 17/65, loĝ.76, 20j, studento, dez. kor. pri moderna muziko, radiotekniko, filozofio, kolektas bildkartojn, poŝmarkon, Sovetunio.

Brigite Clarac, Av.Mariscal Suere, Edif Zenit, Piso 4, No 4B, San Bernardino CARACAS 1011, Venezuela, dez. korespondi pri muzio kaj ekskursoj.

Michael Jonec, sinjoro, 3712-A Tulsa Way, Fort Worth, TX 76107, Usono, deziras interŝanĝi: recenzoj en Esperanto pri nacilingvaj libroj k. Filmoj.

Irina Franŝtejn, 20j, 335000 Sevastopol, str.Lenina 64/18, studentino, deziras korespondi pri mond. muziko, dancoj, lingvoj, turismo, belarto. Sovetunio.

Martin Hönig, Mörikestr.5, D-7050 Waiblingen 7, FR Germanio deziras kor. per *ilustritaj* poŝtaroj, kun ĉiuj landoj deziras interŝanĝi.

Instruisto poeto, Pavano Petras, 234910 UTENA, Spalio 50-ĉio 64-5, Sovetunio, Litovio, Sovetunio, deziras korespondi tutmonde.

Studentino de pedagogio Marina Romanova, 443070 Kujbiŝev, ul. Partizanskaja 106/kv.16 Sovetunio, deziras korespondi tutmonde.

Jelena Budajeva, 443013 KUJBIŜEV, ul. Miĉurina d.11, kv54, Sovetunio, medicistino 19j, deziras korespondi tutmonde.

Amo-Akademio, Tenmori, Kamisidami, Moriyama-ku, Nagoya, 463 Japanio, dez. interŝanĝi kontraŭ japanaj poŝtmarkoj pm pri la ĝisnunaj Olimpikaj ludoj.

Alfredo C.Portillo, Ultramar Express, Av.Andres Bello, Ec.Catleya, Esq.,Av. Los Samanes, CARACAS 1050, dez. korespondi pri tablotenis, sporto.

Esperanto-Grupo Ismael (C.P.10-2416, Brasilia-DF, Brazilo) interŝanĝas Esperanto-librojn.

Juri Ŝevĉenko, Puŝkin pr.64-203, 220073 MINSK, Sovetunio, lernanto, deziras korespondi tutmonde pri sporto, fotado, literaturo.

Otevřená listovní zásilka

Presajo

Imprimé 50%

Esperantský kroužek

Klubu pracujících

CS 29501 Mnichovo Hradiště